



IFES 1970 en Ĉeĥoslovakio

Ci-jare la Internacia Fervoja Esperanto-Skisemajno okazis de la 31a de januaro — 7a de februaro en Vratna Dolina, Ĉeĥoslovakio. La 4 germanaj partoprenintoj troviĝis inter 14 ĉeĥoslovakaj, 10 aŭstraj, kaj 27 francaj geamikoj, do entute 55 personoj. Ja aliĝis ankaŭ poloj, rumanoj kaj hungaroj, sed pro diversaj kialoj ili ne povis veni.

Je tiu loko jam kelkfoje oni raportis pri IFES, mi do hodiaŭ limigos miajn rimarkigojn al detaloj, kiuj diferencigas de la antaŭaj 10 skisemajnoj.

Plej elstara punkto: la unuan fojon tiu aranĝo okazis en alia lando ol Aŭstrio! Du junaj esperantistoj, Ladislav Kovar kaj Ladislav Lani prenis sur sin la laboriĉan taskon organizi la 11an skisemajnon. Konsiderante, ke ambaŭ estas junaj esperantistoj kun malmultaj spertoj pri internaciaj renkontiĝoj, kaj ke ili certe ankaŭ devis barakti en sia lando kontraŭ plej diversaj malfacilaĵoj, mi jen volonte atestas al ili plenan sukceson.

Kortuŝa estis la akcepto flanke de la ĉeĥoslovakaj esperantistoj. Por saluti nin vizitis nian malproksiman domon s-ro Tvarožek, vicprezidanto de la landa Esperanto-Komitato kaj s-ro Blažek, prezidanto de la ĉeĥoslovaka IFEF-sekcio. Ambaŭ alportis kiel premiojn belegajn grandajn vazojn el la fama bohemia kristalo, veraj juvelaĵoj, kiuj turnigite sub lumo ekbrilis en tuta skalo da koloroj! Korajn kaj sincerajn bonvenvortojn ili direktis al ni, same kiel s-ro Zavodsky, la kluba prezidanto en Zilina. Pluraj salutleteroj alvenis, kiujn ni akceptis kun varma aplaŭdo, i. a. de s-ino Kruse (nome de IFEF), de d-ro Ferency (IFEF-junularoj) kaj de s-ro Sadler (UEA).

La skisemajnon eĉ partoprenis s-ro Josef Mraz el Linz, emerita lerneja direktoro 75 jara, kiu tamen en koro kaj spirito restis tute juna. Liaj vortoj kaj deklamitaj poemoj venis el sincera menso kaj tuŝis la korojn de la aŭskultantaro. Komprenoble en la listo de la ĉeestantoj ankaŭ ne mankis s-ro Geroldinger, la sola organizinto de la antaŭaj 10 skisemajnoj. Ci-foje li povis ripozi kaj ĝui kiel gasto kun sia edzino la 11an aranĝon.

Pri la programo oni povas diri, ke la organizintoj grandparte sekvis la antaŭajn skisemajnojn kiel modelon. Tamen: aliaj landoj, aliaj moroj! Dum unu vespero ĝojigis nin s-ro Gustav Hraby per marioneta ludo. Laŭ teksto de la aŭtoro, profesoro Skuba, li perfekte sukcesis translokigi nin en la mondon de Ŝpejbl (patro) kaj Hurvinek (filo), kiuj estas famaj figuroj de la pup teatro en ĈSSR. Pro tiu speciala ĝuo jen nian tutspecialan dankon! Kaj ankoraŭ alia okazaĵo, kiun mi ĉi tie nepre menciu: nia ekskurso al Altaj Tatroj. Kun granda antaŭĝojo ni merkredon entrajniĝis, alcelante faman lokon en la same fama regiono de la Altaj Tatroj. Nek kulpis s-ro Lani nek s-ro Mikeš, la skiinstruisto, sed la vetero kaj multaj aliaj cirkonstancoj, ke tamen tiu ekskurso ne tute kontentigis nin.

Ankaŭ kelkaj aliaj aferoj ne tiel memkompreneble glate funkciis kiel en antaŭaj jaroj. Sed ni ne forgesu, ke ni estis en lando „malantaŭ la kurteno“. La manĝoj ne estis tiel abundaj kaj la restadejo, kvankam bela, granda, kaj komforta, tamen ne estis familiara hejmo, eble pro la fakto, ke tiu nia kabano estis samtempe hotelo, kategorio C kaj nigre vestitaj kelneroj alportis manĝojn kaj trinkaĵojn...

Ni kvar germanaj partoprenintoj laŭpove kontribuis al la aranĝo: nia kara Reĝo Richard König ĉiam zorgis por bonhumoro kaj ofte ni kantis aŭ eĉ dancis laŭ lia buŝharmonika muziko. Dagmar Blaschke, komercantino kaj ĉarmulino, hejmenportis eĉ du premiojn: unue ĉar ŝi estis distingita „Miss IFES“ kaj due ĉar ŝi estis

je la tria loko dum la lingva konkuro (komencantoj). Werner Heimlich (la filo) pro sia ĝentila kaj modesta konduto akiris multajn amikojn. Sinceran dankon ankoraŭfoje al ĉiuj, kiuj kunhelpis, precipe al la du „Ladisloj“. Kien ni veturos venontjare?

Elisabeth Ritterspach

Filatelio

La 3a ekspozicio de la filatelistaj fervojistoj en la Socialorganizo de la Germana Federacia Fervojo okazos la 30/31an de majo en Frankfurt (Main), Franken-Allee 111, Haus Gallus. Tie ekspozicios ankaŭ niaj s-anoj Barmaneter (Augsburg) kaj Mager (Frankfurt) siajn Esperanto-kolektaĵojn.

Dum ambaŭ tagoj speciala poŝtoŝtampo uzos la dekstre prezentitan specialŝtampojn.



Faklingva Angulo

redaktita de G. Ritterspach (Daŭrigo 3)

En la lasta numero vi legis pri fakprelego pasinta, ĉi-foje ni ĵetu rigardon antaŭen al Rimini. Tie vi aŭdos pri transtrakaj pasejoj kaj ilia sekurigo aŭ teknika ŝirmado.

- Transtraka pasejo = Bahnübergang, Wegübergang. Ĝi povas esti relnivela (schiengleich, höhengleich), gardata aŭ negardata (bewacht oder unbewacht), senbariera (unbeschränkt), teknike ŝirmata (technisch gesichert).
- Sekurig-sistemoj = Sicherungseinrichtungen celas helpe de la tekniko certigi sendanĝercon kaj por fervojaj veturiloj kaj por vojuzantoj. Jen kelkaj el ili:
- Barieroj = Schranken

estas ĉe ni preskaŭ senescepte baskulbarieroj (Schlagbaumschranken), nur malofte oni renkontas ankoraŭ rulbarierojn (Rollschranken). Se ambaŭflanke de la relvojo estas po unu mallonga bariero ĝis vojmezo, oni nomas tion duonbarieroj (Halbschranken). Ili funkcias plej ofte aŭtomate, kompletajn barierojn manipulas kutime fervojisto loke ĉeestanta. Kiam la manipulisto troviĝas malproksime en stacio aŭ signalejo, oni aplikas teleparol-regadon (Anrufschranke).

— Vojlumsignaliloj = Warnlichtzeichen. Plej okulfrapa estas intermita ruĝa lumo (rotes Blinklicht), ofte ĝi estas kombinita kun porlokomotivista intermitlumkontrolilo (Lokführer-

überwachungssignal). Tiu ĉi kromlampro lumas en la direkto al la proksimiĝanta trajno kaj indikas al la lokomotivisto, ĉu la vojlumsignaliloj funkcias aŭ ne. Ili lumas nur dum certa tempo kiel.

- Averta pri proksimiĝo de trajno = Warnung bei Zugannäherung. Dum la cetera tempo la lampoj estas senlumaj. La ekfunkciadon realigas.
- Pedaloj kaj relcirkvitoj = Schienenkontakte und Schienenstromkreise. Sed ŝajnas al mi, ke ne nepre necesas pli detale klarigi la elektroteknikaĵojn. Venu al la fakprelego en Rimini kaj lernu, ke transtrakaj pasejoj estas absolute sendanĝeraj, se ĉiuj vojuzantoj respektas la sekurig-instalaĵojn.

Nekrologo

La 8an de decembro 1969 mortis nia longjara fidela membro Wilhelm Jahnke, stacidomo Lübeck manrova-stacio, 64jaraĝa. Ĉiam li estis bonvena gasto en nia Esperanto-rondo. Ni dankas pro la fideleco kaj kunlaboro. Al la familianoj de la mortinto ni sincere kondolencas.

Distrikt-komisiito Karlsruhe

1950 mi trovis leksikonon en la libroŝranko de mia patro kun klarigoj pri Esperanto. Mia intereso vekita pri la Internacia Lingvo bedaŭrinde jam baldaŭ pasis. Kvar jarojn poste mi kontaktis kun Esperantisto, kiu ree vekis miajn simpatiojn pri la lingvo. Parte aŭtodakte, parte per studado en kursoj de la Esperanto-grupoj Heidelberg kaj Mannheim mi perfektigis mian lingvoscion. 1956 mi jam partoprenis IFEF-kongreson en Stockholm. La impresado estis tiom forta, ke en la sekvontaj jaroj mi ĉeestis preskaŭ ĉiujn IFEF-kongresojn. Ankaŭ la jarkunvenojn de GEFA mi vizitis ek de Fulda.



J. Hug

Kiel distrikt-komisiito mi gvidis kelkajn kursojn por komencantoj; unue en Heidelberg kaj poste en Karlsruhe. Komune kun kelkaj kapablaj helpantoj mi preparis kaj aranĝis GEFA-jarkunvenon en Heidelberg. Dum la pasintaj jaroj mi interkonatiĝis kun eksterlandaj kolegoj kaj korespondas de tiam kun fervojistaj amikoj.

Aus den Gruppen

Essen

Im Auslandsinstitut Dortmund der Rheinisch-Westfälischen Auslandsgesellschaft treffen sich die Esperanto-Freunde von Dortmund und Umgebung regelmäßig montags um 18 Uhr. Unser Kollege Günter Bartz hat sich erfolgreich dafür verwendet, daß die, in dem sehr geschmackvoll und in Mehrfarbendruck aufgemachten Programmheft, enthaltenen Hinweise auf die Esperanto-Veranstaltungen nunmehr auch in der Internationalen Sprache erscheinen.

Köln

Nia kolego kaj longjara membro Karl Könemann, Kolonjo, festis sian 40-jaran membrecon en GEA. Kiel signon de rekono kaj danko pro fidela membreco kaj kunlaborado, la prezidanto de GEA transdonis al li honoran dokumenton. Nome de GEFA koran gratulon al nia fidela kolego, kiu nun jam de 20 jaroj estas membro de IFEF/GEFA.

Aŭ-Aŭ kaj Helaŭ en Münster

Vere internacia atmosfero regis je la 7-2-1970 en la BSW-kunvenejo Münster. La fervojista Esperanto rondo invitis siajn gefrezenajn membrojn kaj malsaĝajn amikojn al grava eksterordinara kunsido karnavala. El tri landoj venis la partoprenantoj: el Nordrhein-Westfalen, el Niedersachsen kaj el Francujo, pli bone: el Münster, Burgsteinfurt, Osnabrück kaj Parizo, ankaŭ gastoj el la frenezula mondorganizo LIFKAU.

La malsaĝulojn atendis lerteleornamita salono kaj

bongusta kafo, krome kukojoj en grandega amaso. Eĉ orkestro tute ne mankis. Sed ĉar la muzikistoj volis mem festi, la muzikon oni antaŭe sursonbendigis. La senato enmarŝis kun granda aplaŭdo, kaj post la salutvortoj de la prezidanto Willi I. al la freneza popolo komenciĝis valora programo.

Unue staris en la barelo gazetraportisto kaj rakontis pri sia profesio. Poste kantis la mondkonata „duo geŝrap“. Judi, la eta patrino, raportis el ĉiutaga mastrulaboro. Granda sukceso estis la skeĉo „Jetti kun siaj sagacaj maristoj“. La franca gasto amuzis per ŝercaj poemoj. La ampleksan programon riĉigis parolado de gaja Gertrud, salutita per Helaŭ kaj Aŭ-Aŭ.

Kompreneble ĉiuj „artistoj“ estis honorigataj per ordenoj. Ĉarma sinjorino akompanis la karnavalistojn al kaj el la barelo. La „organiza komikato“ antaŭvidis premiadon de la honora krokodilo. Estis tute ne eble, fordoni la premion, ĉar neniu krokodilis, aligatoris ktp.

Estis agrabla, ke ĉiuj gastoj venis gaje vestitaj. Ankaŭ ili alportis humoron kaj soifon. La malsaĝa societo dancis multe, trinkis vinon kaj festis en bona harmonio. Certe en la venonta jaro okazos la sama festo, verŝajne en Osnabrück. La festintoj estas nun veraj fakuloj por karnavalo, ĉar dum la kunsido ili partoprenis kurson „karnavalo-programita“. Roe

Sciigo

Laŭ „The British Esperantist“ la decimal-sistemo validos ek de la 15-a de februaro 1971 en Britio.



IFES 1970 en Ĉeĥoslovakio

Ci-jare la Internacia Fervoja Esperanto-Skisemajno okazis de la 31a de januaro — 7a de februaro en Vratna Dolina, Ĉeĥoslovakio. La 4 germanaj partoprenintoj troviĝis inter 14 ĉeĥoslovakaj, 10 aŭstraj, kaj 27 francaj geamikoj, do entute 55 personoj. Ja aliĝis ankaŭ poloj, rumanoj kaj hungaroj, sed pro diversaj kialoj ili ne povis veni.

Je tiu loko jam kelkfoje oni raportis pri IFES, mi do hodiaŭ limigos miajn rimarkigojn al detaloj, kiuj diferencigas de la antaŭaj 10 skisemajnoj.

Plej elstara punkto: la unuan fojon tiu aranĝo okazis en alia lando ol Aŭstrio! Du junaj esperantistoj, Ladislav Kovar kaj Ladislav Lani prenis sur sin la laboriĉan taskon organizi la 11an skisemajnon. Konsiderante, ke ambaŭ estas junaj esperantistoj kun malmultaj spertoj pri internaciaj renkontiĝoj, kaj ke ili certe ankaŭ devis barakti en sia lando kontraŭ plej diversaj malfacilaĵoj, mi jen volonte atestas al ili plenan sukceson.

Kortuŝa estis la akcepto flanke de la ĉeĥoslovakaj esperantistoj. Por saluti nin vizitis nian malproksiman domon s-ro Tvarožek, vicprezidanto de la landa Esperanto-Komitato kaj s-ro Blažek, prezidanto de la ĉeĥoslovaka IFEF-sekcio. Ambaŭ alportis kiel premiojn belegajn grandajn vazojn el la fama bohemia kristalo, veraj juvelaĵoj, kiuj turnigite sub lumo ekbrilis en tuta skalo da koloroj! Korajn kaj sincerajn bonvenvortojn ili direktis al ni, same kiel s-ro Zavodsky, la kluba prezidanto en Zilina. Pluraj saluleteroj alvenis, kiujn ni akceptis kun varma aplaŭdo, i. a. de s-ino Kruse (nome de IFEF), de d-ro Ferency (IFEF-junularoj) kaj de s-ro Sadler (UEA).

La skisemajnon eĉ partoprenis s-ro Josef Mraz el Linz, emerita lerneja direktoro 75 jara, kiu tamen en koro kaj spirito restis tute juna. Liaj vortoj kaj deklamitaj poemoj venis el sincera menso kaj tuŝis la korojn de la aŭskultantaro. Komprenoble en la listo de la ĉeestantoj ankaŭ ne mankis s-ro Geroldinger, la sola organizinto de la antaŭaj 10 skisemajnoj. Ĉi-foje li povis ripozi kaj ĝui kiel gasto kun sia edzino la 11an aranĝon.

Pri la programo oni povas diri, ke la organizintoj grandparte sekvis la antaŭajn skisemajnojn kiel modelon. Tamen: aliaj landoj, aliaj moroj! Dum unu vespero ĝojigis nin s-ro Gustav Hraby per marioneta ludo. Laŭ teksto de la aŭtoro, profesoro Skuba, li perfekte sukcesis translokigi nin en la mondon de Spejbl (patro) kaj Hurvinek (filo), kiuj estas famaj figuroj de la pupteatro en ĈSSR. Pro tiu speciala ĝuo jen nian tutspecialan dankon! Kaj ankoraŭ alia okazaĵo, kiun mi ĉi tie nepre menciu: nia ekskurso al Altaj Tatroj. Kun granda antaŭĝojo ni merkredon entrajniĝis, alcelante faman lokon en la same fama regiono de la Altaj Tatroj. Nek kulpis s-ro Lani nek s-ro Mikeš, la skiinstruisto, sed la vetero kaj multaj aliaj cirkonstancoj, ke tamen tiu ekskurso ne tute kontentigis nin.

Ankaŭ kelkaj aliaj aferoj ne tiel memkompreneble glate funkciis kiel en antaŭaj jaroj. Sed ni ne forgesu, ke ni estis en lando „malantaŭ la kurteno“. La manĝoj ne estis tiel abundaj kaj la restadejo, kvankam bela, granda, kaj komforta, tamen ne estis familiara hejmo, eble pro la fakto, ke tiu nia kabano estis samtempe hotelo, kategorio C kaj nigre vestitaj kelneroj alportis manĝojn kaj trinkaĵojn...